

SCIENCA REVUO

volas

- (1) subteni la ĝeneralan sciencan nivelon de sia legantaro, pri ĉiaj temoj;
- (2) helpi al la fratiĝo de la homoj, libere diskutigante pri la disigaj konceptoj laŭ sciencaj normoj;
- (3) science studi la problemojn de la Esperantismo;
- (4) evoluigi la lingvon laŭ sciencaj bezonoj, surbaze de la principo de sufiĉo kaj neceso.

Por tiu celo ĝi bezonas ne nur redakcion kaj legantojn, sed ankaŭ verkantojn.

Vidu ankaŭ paĝon 3 de la kovrilo de la unua numero de tiu ĉi jarkolekto.

D-ro W. Manders

INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO

ENHAVO

Interlingvistika parto

- | | |
|-------------|--|
| Ĉapitro I | <i>La interlingvistiko kaj Esperanto.</i> |
| Ĉapitro II | <i>La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen.</i> |
| Ĉapitro III | <i>La naturalismo de IALA.</i> |

Esperantologia parto

- | | |
|------------|--|
| Ĉapitro IV | <i>Taskoj de la esperantologio.</i> |
| Ĉapitro V | <i>La evoluo de Esperanto. Lingva korekteco.</i> |
| Ĉapitro VI | <i>Kompara esperantologio.</i> |

prezo 2.25 Ned. guld. / £ —.5.— / \$ —.75

J. MUUSSES — ELDONISTO

Purmerend - Nederlando

Vol. 7-a. N-ro 4-a (28-a)

Paĝoj 121-160

15-11-1955

121

UDK 001(05) = 089.2(100)

SCIENCA REVUO

ELDONO DE J. MUUSSES PURMEREND NEDERLANDO

Sendependa revuo. Aperas kvarfoje jare. Ab.pr. Ned.gld. 5.-, \$1.50, aŭ egalvaloro. Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.)

Redaktoroj: D-ro G. Hamming, D-do G. F. Makkink kaj D-ro W. P. Roelofs. **Sekretario de la Redakcio kaj Reprezentanto por I.S.A.E.:** G. F. Makkink, Eekhoornlaan 10, Bennekom, Nederlando. **Administracia adreso por abonantoj, kiuj ne estas membroj de I.S.A.E.:** J. Muusses, Purmerend, Nederlando, Ĝironumero 15062 - **Sekretario de I.S.A.E.:** S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 nb, Johanneshov, Svedujo, Poŝtkonto 190976.

045 = 089.2

SCIENCA REVUO AŬ SCIENCAJ REVUOJ?

de G. F. MAKKINK

La malbona situacio de Scienca Revuo estigis dum la bologna kongreso diskuton pri kiu oni povas informiĝi el la raporto de la tiea ISAE-kunveno (vidu p. 157). Prof. P o p o v i ĉ skribis pri la situacio al la redakcio kaj mi permesas al mi ĉerpi el lia letero jenon:

„Homoj hodiaŭ vivas precipe en la sferoj de sia fako, eventuale ilin okupas parte ankaŭ parencaj fakoj, sed pri aliaj sciencoj ili interesiĝas nur ĝenerale, supraj. Pro tio iu ajn fakulo trovos en la nuna „Scienca Revuo” malofte la artikolon kiu lin interesas (krom ĝeneralaj kaj terminologiaj problemoj). Tio estas tute komprenebla, ĉar SR estas ĝenerala revuo kaj ĝi ne povas, malgraŭ sindona klopodado de la redaktoroj, kontentigi ĉies dezirojn. Mi opinias ke la ĉefa kaŭzo de la tre modesta nombro de la abonantoj kuŝas en tio. Gazeto kiu estus pli faka havus, laŭ mia konvinko, pli multajn abonantojn inter la nuna multnombra esperantistaro (eĉ inter neesperantistaj sciencaj rondoj), precipe inter amatoroj de la koncernaj fakoj.

Pro tio mi proponas ke la nuna Scienca Revuo restu nia gazeto por precipe sociologiaj problemoj kaj ni transiru al pli vasta, malpli „modesta” gazeteldonado. Vi ja scias ke Medicina Revuo jam ekzistas kaj (malgraŭ la komencaj malfacilaĵoj) ĝi ekvivas, kaj ĝi vivos, precipe se estos kunlaboro inter diversaj fakaj sciencaj gazetoj. Same oni povas, en diversaj landoj, tie kie la kondiĉoj estas plej favoraj, komenci kun aliaj fakoj. Ekz. mi estas preta transpreni la redaktadon de unu gazeto pri astronomio, fiziko kaj matematiko, iu povas transpreni poste teknikan gazeton, biologian ks.

La enhavo devus esti science diversnivela: 1) bonaj popularsciencaj artikoloj, 2) informoj pri atingiĝoj el koncernaj fakoj, 3) resumoj de la originalaj

sciencaj artikoloj el aliaj revuoj, 4) recenzoj pri gravaj aperaĵoj el la faka literaturo, 5) interesaĵoj precipe internacie signifaj, 6) terminologiaj diskutoj, ktp. Same la amatoro kiel la sciencisto trovos ion interesan en tia gazeto, kaj pro tio plimultnombriĝos la abonantoj. Komence oni devas certe helpi finance tian gazeton aŭ kalkuli kun la faka kaj esperantista konscienco de la homoj. En multaj landoj oni povas ricevi ankaŭ la ŝtatan helpon, almenaŭ per abonigo de sciencaj institucioj. Ĉu vi ne samopinias? Se ne, tiam ni pri-diskutu la demandon, sed dezirinde estas fari tion publike, pere de Heroldo, Esperanto ktp., ĉar tiamaniere ni preparas la esperantistaron kaj ni tuj ricevos ilian subtenon (se ili aprobas — se male ni ne komencos!)."

D-ro Roelofs donis jenan komenton al la proponoj de prof. Popoviĉ:

„Mia opinio estas: Aperu kiel eble plej multe da vere *fakaj* artikoloj en Esperanto, tamen ne en specialaj esperantlingvaj gazetoj, sed en la jam tro multaj *fakaj* gazetoj aperantaj en ĉiuj landoj de la mondo. Eĉ se oni devas provizore kontentiĝi per tio ke la kara artikolo — kiun oni en angla aŭ franca lingvo povus publikigi eble en unuaranga faka gazeto — sub sia esperanta vesto eble estas akceptata nur de redakcio de malpli renoma gazeto, oni konsciu ke el vidpunkto de renomo pure esperanta gazeto atingus nur ŝtupon ankoraŭ malpli altan. Ni ja devas konstati — kaj ni tion faras kun sincera bedaŭro kaj insista riproĉo — ke la apero de porfakula artikolo en Esperanto estas ankoraŭ maloftaĵo, ke la pli multaj, fakte preskaŭ ĉiuj publikigaĵoj de sciencistoj esperantistaj aperas en la lingvoj angla, germana, kaj franca. Evidente la deziro de la aŭtoroj ke la samfakanoj povu tuj legi tiujn publikigaĵojn estas pli forta ol tiu, forigi la ĥaoson de la multlingveco. Tiun sintenon neniel forigus la ekzisto de sciencfakaj gazetoj esperantaj. Do en ili aperus kredeble grandparte artikoloj jam aperintaj ekz. anglalingve en pli grava gazeto. Do preskaŭ nenian utilon havus la posta publikigo de la sama artikolo en ia malgrava esperantlingva gazeto, kaj kredeble nur malmultaj aŭtoroj farus la penon de la duobla publikigo.

Ni povos venki nur en unu maniero: Ni, sciencistoj esperantistaj devas konscii ke nia esperantisteco implicas por ni ne ĉiel agrablan devon. Ni ne povas, ne rajtas apartigi tiun esperantistecon (kiu ja celas la forigon de la multlingveco ankaŭ el la tutmonda scienca literaturo) de nia faka, scienca laboro. Nur se impone kreskos la ofteco de esperantlingvaj artikoloj originalaj kaj altnivelaj, — t.e.: nur se ni ĉiuj, senescepte, prenas sur nin la ne ĉiam allogan ŝarĝon de la pionireco, nur se ni ĉiuj publikigas ĉion destinitan por internacia publiko en la lingvo internacia — nur tiam ni povas ekspekti progreson kaj sukceson. Gazetoj kiuj akceptos artikolojn en la internacia lingvo feliĉe jam estas troveblaj. Ni klopodu por ke kreskantan parton de tiuj gazetoj plenigu artikoloj internacilingvaj, kaj tiel ni provu atingi laŭ vojo nerekta la celon montritan de Profesoro Popoviĉ.

Koncerne Scienca Revuon: ĝi restu kia ĝi estas: neporfakula gazeto ĝenerale scienca. Kaj ĝiaj legantoj klopodu interesiĝi iom pri temoj ekster la propra fako, temoj pri kiuj ni ordinare scias multe tro malmulte. Kaj eĉ se ni ne povas, kiel Goethe kaj liaj antaŭuloj, posedi la tutan sciencon de nia tempo, sed nur malgrandan parton de pli vasta fako, ni almenaŭ provu trovi kelkan tempon ankaŭ por la cetero en la mondo, por iom resti homo kaj ne perdiĝi plene en fakuleco!"

Mi volas unue rimarkigi ke prof. Popoviĉ kaj d-ro Roelofs parolis pri diversaj aferoj, kiuj apenaŭ tuŝas sin reciproke. P. ja ne temas pri originalaj sciencaj verkaĵoj en sia mencio de la estonta enhavo de kreotaj fakrevuoj, li nur nomas *informojn pri fakaj atingiĝoj, resumojn, recenzojn* ktp. R. kontraŭe traktas pri la publikigado de originalaj sciencaj verkaĵoj en Esperanto. Pri tio prof. P. eble samopinias kun d-ro R.

P. proponas spliti Scienca Revuon al du aŭ tri branĉoj laŭ fakoj, kaj se mi bone komprenas, ilia karaktero estu pli-malpli egala al tiu de la nuna Scienca Revuo. D-ro R. deziras ke Scienca Revuo restu kia ĝi estas.

La centra punkto estas: ĉu la ĉiuscienca karaktero de S.R. estas malhelpo al la akirado de la necesa nombro de abonuloj. P. supozas ke jes kaj proponas kiel solvon disspliti Scienca Revuon. R. kontraŭe opinias ke S.R. povas eliri la krizon en ĝia nuna formo.

Do fakte restas diskutinde:

- 1) ĉu la nuna S.R. atingis sian plafonan abononombbron?
- 2) ĉu ĉiu el la du aŭ pli kreotaj prifakaj sciencaj revuoj povos akiri la necesan nombron de abonuloj?

Oni povas spekulativi pri tiu demando, sed tio nenion garantias. Oni ankaŭ povus fari eksperimenton, komencante eldonadi diversajn fakajn sciencajn revuojn. Tiu eksperimento tamen signifus nova risko por la eldonisto. La tria vojo estas daŭrigi la serĉkampanjon, kiu la redakcio kaj eldonisto jam faradas, por eltrovi ĉiujn eblajn abonulojn en la mondo. Ĉe tio ni petis la helpon de perantoj kaj deligitoj de ISAE kaj la kunlaboron de la redakcioj de diversaj esperantistaj gazetoj. Multaj provnumeroj kaj recenzekzempleroj estas dissenditaj. Ĝis nun la rezultoj estas seniluziigaj.

Eble ni devos apliki alian metodon por inventari la aktivajn esperantistajn scienculojn laŭfakaj. Post tio ni povus taksi la eldoneblon de iaj sciencaj revuoj. Pri la amatoraj sciencamantoj tamen oni nur povas fari divenajn taksojn.

La abonemo kaj pagivo tamen restas necertaj faktoroj.